



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 13-a de Septembro 2021

(ĉeesta kunveno apud nia nova oficejo en Alon-turo II, 4-a etaĝo)

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la pasinta (julia) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj jam enretigita.*

### **1. Raportoj** (Amri)

- a) UEA malkoncentrigas la Centran Oficejojn por ŝpari monon: ili vendas la domon en strato Binnenweg, uzonte sian alian domon; parto transiros al Dubnice en Slovakio, la Libroservo k Biblioteko Hodler – al la IEM en Vieno.
- b) La 18-an de Septembro okazos la Komitat-kunsido de UEA, kaj Eran anstataŭos min pro antaŭplanita vojaĝo.
- c) Ĝis la 19-a de Septembro la siatempaj aliĝintoj povos spekti la registritajn programojn de la VK.

### **2. La ĉikanado far la Societ-Registristo** (Jehoŝua)

Ĝis la trompa agado de nia malbonvola ano al tiu instanco ĉiujare ni ricevis la ateston de nia pura, senerara agado kaj librotenado. Depost tiam oni “ŝerĉas nin” pri ĉiu alineo, jam sendepende de la tiamaj eventoj. Propono: du reprezentantoj de ELI, el la Estraro, devos viziti en la oficejo de la Registristo, trovi fizike la homon kiu levas la malfacilaĵojn, kaj raporti al li/ŝi pri nia societo, pri nia agado, por ekkonigi nin al ili.

### **3. La 21-a Israela Kongreso** (Jehoŝua, Amri)

- a) Bedaŭrinde, ĉi-jare ĝi okazos nur por israelanoj, Ni rezervis fine nur 4 ĉambrojn por tranoktado. Eble Jinon kaj lia flegisto aliĝos lastmomente – dependas. Aliaj venos nur al la programoj. La tranoktadon de Mikaelo ni devos solvi iel.
- b) Okazos nur la vendreda solena vespermanĝo (anstataŭ du). Do – la elspezo devus iom malaltiĝi! – Nava devas paroli kun ili.
- c) Mikaelo koncentrigos la artan programon. La kadron – la tempojn kun la supozitaj enhavoĵ – liveris Amri. Mikaelo baldaŭ sendos la malneton de la programo por kontroli.

### **4. Oficejo** (Amri)

- a) Estas jam kontrakto – sed kun iu korektenda eraro. Estas jam averto niafavore en la Katastrejo ("טאָר"). Ĝis la fino de la transakcio la mono estas deponita ĉe la advokato d-ro Modan.
- b) Endas akiri lanton por la Oficejo! Intertempe ni pagas monate 1,250 NIS. La lupago ricevota povus esti ĉ. 2,000 sikloj (kaj aldone ni NE pagos la s.m. elspezon).
- c) Post la aĉeto de la oficejo restis en nia kaso ĉ. 145 mil sikloj.
- ĉ) Ni devas klopodi akiri magazenon por niaj libroj – malmultekostan, ne nepre centran.

.../2

**5. Dratverejo** (Amri, Ŝlomo)

a) La kontrakto estis subskribita dum la Somerfina Renkontiĝo. La unuan pagon de 3,200 NIS ricevos Lior, la prizorganto de la loĝejo por ni. El la postaj pagoj li ricevos 5% en la unua jaro kaj 7% ekde la dua jaro.

b) Bedaŭrinde, ni devis forĵeti ĉiujn meblojn, kiu restis nia havaĵo en la loĝejo, sed la luantoj estas gefiloj de konstru-entreprenisto, kiu plibeligos la loĝejon.

**6. La Somerfina Renkontiĝo** (Jehoŝua)

Ĝi okazis la 30-an de aŭgusto, je 18:00, en la restoracio *Piazza Grande*, en Sarona.

Partoprenis 10 personoj. *La Estraro esprimas sian dankon al Miĥal, Doron kaj Dror por ilia pena klopodo trovi taŭgan lokon* (anstataŭ la ĝisnuna AlterNativ, kiu fermiĝis).

**La venonta kunsido:** lundon, la 11-an de Oktobro 2021, en *Bejt-WIZO* (avizo sekvos).

*Protokolis: Gabi Zeevi*